

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2017-04-15 ĝis 2017-07-15.

Eventoj

JARO DE LA LERNANTO (JdL)

La Estraro preparis konkludojn kaj raportojn siaflanke pri JdL por la ILEI-kongreso en Busano kaj UK en Seulo. Kadre de la JdL la prezidanto partoprenis SAT-amikaran kongreson en Nantes, Francio, IFEF-kongreson en Colmar, Francio, kaj GEA-kongreson en Freiburg, Germanio prelegante.

Vivo de la Ligo

Maje-junie okazis diskutfazo kaj voĉdonado ene de la Komitato pri jena demando: ĉu ILEI enkonduku por la kongreso en Busano 2017, ke komitatano de sekcio XY, partoprenante la komitatkunsidojn dum la Kongreso en Busano, Koreio, rajtu voĉdoni nome de iuj komitatanoj el iuj sekcioj (maksimume tri), kondiĉe, ke tiu persono alportas skriban konsenton de sia kolego, de siaj kolegoj. Plie, 4 estu la maksimuma nombro de voĉoj transdonitaj de unu persono. La decido: jes. Tiel ni povas esperi atingi la kvorumon dum niaj koreaj kunsidoj.

Komence de majo la plej granda parto de la ILEI-arkivo translokiĝis el Budapeŝto HU al Herzberg-am-Harz DE laŭ la inerkonsento inter la Prezidanto de ILEI Mireille Grosjean, la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kaj la Prezidanto de AGEI Zsófia Kóródy. Herzberg estas la oficiala arkivloko de ILEI. ILEI arkivoj ankaŭ kuŝas en Massa IT kaj en CDELI, La Chaux-de-Fonds CH.

Kapabligo

Ĉar diversaj esperantistoj esprimis tian deziron, ILEI pripensas organizi apartajn ekzamenojn pri la kulturaj kaj movadaj konoj suplemente de KER-ekzamenoj, kiuj testas nur komunikan kapablon. La itala EO-instituto jam realigas tion kaj io simila estas kreata en Germanio. ILEI intencas gvidi siajn membrojn al tiu germana senpaga platformo baldaŭ aperonta.

Koleghelpa Kaso (KhK)

Fine de aprilo la Prezidanto Mireille Grosjean kontrolis la liston de la subvenciataj anoj per persona alvoko al ĉiu membro tiel subvenciita; ŝi preparis resuman dokumenton, kiu estis aprobita fare de la Estraro.

Kongresoj

La 50-a ILEI-kongreso en Busano, Koreio.

Tiu evento aperas kiel rekorda, kun 196 aliĝoj el 29 landoj.

Decidiĝis interkonsentite kun la ĉefo de LKK Sinjoro PARK Yong Sung "Nema", ke LKK organizos busveturon Seulo - Busano la 15-an de Julio dufoje dum la tago.

Dum majo-junio la Estraro – subgvide de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović – preparis programon kaj ĉiujn aliajn bezonaĵojn, solvis diversajn taskojn kaj kurantajn aferojn. La Prezidanto Mireille Grosjean kompilis enkondukan prelegon por la solena malfermo laŭ la kongresa temo *Edukado al respektplena Turismo*. Aliaj estraranoj preparis siajn programerojn.

Jam estas konfirmita metodika seminario dum la kongreso sub la gvido de Katalin Kovats – instruista trejnado (IT).

Junie la Estraro preparis diplomojn por 3 partoprenintinoj, kiuj desegnis emblemojn por la 50-a ILEI-kongreso en Busano. Estis lernantinoj el 3 landoj: Koreio, Serbio, Rusio. Gajnis koreanino.

La Prezidanto kaj la estrarano pri kongresoj regule freŝigis informon pri la kongreso en sociaj retoj, inkluzive la laborgrupon “ILEI labortable” ĉe Facebook.

La programo de la kongreso estas tre bunta kaj abunda, kio pravigas la novan nomon “kongreso” por nia ĉiujara fizika renkontiĝo.

Venontaj kongresoj

Paralele kun la laboro por prepari la eventon en Busano, la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović sukcesis esplori pri taŭga loko en proksimeco de Lisbono, Portugalio, loko de UK 2018. Finfine Hispana Esperanto-Federacio (HEF) sendis oficialan inviton por ILEI-kongreso en 2018. La Estraro akceptis la kandidatiĝon de Madrido por la ILEI-kongreso. Kaj jam komenciĝis prepara laboro. La unuaj informoj estis komunikitaj jam dum la ĵus fininta la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo. Estis difinita temo de la kongreso: *Kultura heredaĵo de Esperanto*. Jam estas difinita la kongresejo: Universitato Chaminade de Madrido. La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović kaj la kasisto William Harriskunlabore kun la Prezidanto de HEF kaj la formiĝanta LKK prilaboras informojn pri eventualaj prezoj kaj loĝ- kaj lukondiĉoj por konstrui la kotiztabelon kaj skizi la kongresan buĝeton. La kotiztabelo, aliĝilo kaj pliaj konkretaj informoj por aliĝontoj estos prezentitaj dum la ILEI-kongreso en Busano kaj UK en Seulo. En IPR 2/2017 aperis jam aktuala informo pri la kongreso 2018.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

La Estraro ricevis sinroponon el Brazilo por fariĝi ILEI-sekciestro. Temas pri Aristóphio Andrade Alves Filho. La posteno vakis de pluraj monatoj. Modifoj okazis kaj estos traktataj de la Estraro en Busano en Ĉilio, Katalunio kaj Kubo.

Serbia sekcio de ILEI gvide de Radojica Petrović preparas la Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj REF 2017, SAT-kongreson 2018 en Kragujevac, ambaŭ en Serbio, plenumas multan administran laboron tiucele.

Bedaŭrinde, fine de aprilo alvenis nur 13 raportoj de sekcioj kaj reprezentantoj por la jara raporto. Tamen ILEI havas 39 sekciojn kaj 13 reprezentantojn. Do, la Ligo devus ricevi entute 52 raportojn. Tiu agadkampo bezonas plian aktivigon.

Estrararo

LA Prezidanto sendis gratulmesaĝon al la Prezidanto de Hungara Esperanto Asocio HEA okaze de ilia nacia kongreso. Al la membroj de la pola Parlamento, kiuj organizis solenan eventon memore al nia Majstro Zamenhof. Al la Kongreso de la Fervojistoj IFEF, kun kiuj ni estas en kunlabora kontrakto.

Junie la kasisto William Harris finpreparis la financon raporton kaj la buĝetan rezulton de ILEI por 2016.

La demandaro pri EO-centroj, kiu okazas kunlabore kun UEA, pretas. Tamen la enretigo survojas kaj ne pretas.

Maje-junie la ĉefaj zorgoj por la Estraro estis preparado al la ILEI-kongreso. La Prezidanto ellaboris la tagordojn por la komitat-kunsido kaj estrar-kunsido.

Julie venis malbona novaĵo pri la sano de nia kasisto William Harris. Post komenca tre negativa raporto alvenis pli pozitivaj novaĵoj. Li estas resaniĝanta. Tamen li ne povos atingi Koreion.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

La Estraro daŭrigis solvodon de la problemo pri nesendo de kelkaj numeroj – IPR 2016/3 kaj 2016/4.

Komence de majo la Prezidanto Mireille Grosjean havis longan pertelefonan paroladon kun Ivo Vercammen, prezidanto de Flandra EO Ligo (FEL), kiu printis IPR, por rezulte kaj fine klarigi la situacion de la paneo. Poste ŝi dissendis al la membraro komunikon kun detalaj eksplikoj. Junie venis plezuriga novaĵo, ke IPR 2017/2 alvenis, komenciĝis reta dissendado. La presado estis perfekta, la laboro kaj la dissendado estis rapida. Gratulojn kaj koran dankon al Stano Marček en Slovakio pro la perado inter ILEI kaj la presejo! Dume ILEI-Estraro kune kun la redaktoro Jozefo Nemeth esploras pri represado kaj resendado de du perditaj IPR 2016/3-4 al tiuj abonantoj, kiuj ĝis nun ne ricevis ilin.

Juna Amiko (JA)

La Prezidanto Mireille Grosjean decidis mem financi la diferencon de la kosto inter parte kolora kaj plenkolora revuo por la 3 numeroj de 2017. Dankon al Mirejo! Ŝi ankaŭ proponis – surbaze de opinioj de la membraro de ILEI – pripensi pri la nomo de la revuo kaj ĝia “modernigo”. Estas diskutenda afero.

Junie la Estraro lanĉis novan esploron pri uzado de la materialoj de JA en instruado de Esperanto. La respondeculo pri tiu tasko Elena Nadikova skizis la demandaron por enketado.

ILEI en la Reto

Regule plenumiĝas kaj freŝiĝas informo pri la Ligo kaj ĝia agado ĉe la paĝaro www.ilei.info kaj en Facebook (laborgrupo “ILEI labortable”)

Kunlaboro kun UEA

Dum la dua duono de aprilo la Prezidanto partoprenis la kunsidon de la Estraro de UEA en Roterdamo. Poste ŝi gvidis ankaŭ en AMO-seminaron en la Kulturcentro Greziljono, Francio.

Maje okazis **AMO LIMA** en Les Brenets, Svislando, kaj Villers-le-Lac, Francio – jam la 35-a tia seminario. Unua-foje por AMO-programo de UEA la temo estis specife eduka. La seminario altiris 16 partoprenintojn, el Danlando, Francio, Germanio, Hungario, Nederlando kaj Svislando. Intensa kaj bone preparita programo atendis la seminarianojn. Ĝia realigo estis en la spertaj manoj de Katalin Kováts, loka instruistino Mónica Molnár kaj Mirejo Grosjean. La prezidanto de ILEI prizorgis loĝistikon. Seminarianoj pridiskutis la nuntempe haveblajn rimedojn por la instruado: lernilojn, legolibrojn, antologiojn kaj didaktikajn librojn. Okazinta rolludo celis prezenti Esperanton por iuspeca instruado en lernejo.

La partoprenintoj esploris ankaŭ pri graveco de akceptataj ekzamenoj kaj la rolo de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo; pri la nuntempa traktado en projekto de ALTE – la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo, en kiu UEA membras; vizitis privatan lernejon *La Granda Ursino* en La Chaux-de-Fonds, kie Esperanto ludas gravan rolon en la studplano. Laŭ la impresoj: “Bona laboro, bona etoso, agrabla grupo”.

La AMO-programo per tio aldonas novan landon, Svislandon, al sia dekomence kvar-kontinenta repertuaro. Ĝis aprilo 2017 la AMO-programo neniam traktis specife edukajn temojn, en Svislando ĝi tion faris.

La Prezidanto Mireille Grosjean kaj vicprezidanto de UEA Stefan MacGill pridiskutis detaladon de la disponigo de UEA por ILEI en 2017. Mireille preparis finanĉan raporton pri tiu disponigo.

Mireille Grosjean preparis prelegojn por la ILEI-kongreso en Busano kaj por UK en Seulo. La komisiito de ILEI pri la partopreno de ILEI en UK Marija Belosevic el Kroatio faris elstaran laboron por starigi brilan programon por la Tago de la Lernado.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

Daŭras interkonsentoj kaj diskutoj pri kunlaboro inter ILEI – UEA – **lamuzeo en la universitato en la ĉina urbo Zaozhuang**. Dum la ILEI-kongreso kaj antaŭa estrarkunsido de ILEI estos fine decidota pri la maniero kaj tempo subskribi la definitivan kontrakton.

Junie la Prezidanto Mireille Grosjean kolektis dokumentojn de ontaj observantoj de ILEI ĉe **UNESKO** por prezenti ilin al la Komitato dum la kongreso en Busano.

Junie la Estraro iom diskutis pri daŭrigo de kunlaboro inter ILEI kaj FIPLV.

La Prezidanto Mireille Grosjean subtenis la iniciaton de la elstara belga kolego-esperantisto Germain Pirlot kolekti materialon pri rolo de edukistoj ene de lernejoj, konsiderante modernan situacion en edukado kaj diversajn sociajn problemojn. La iniciato estas apogata per la retejo de ILEI. La celo de tio estas aperigo de la rezultoj en la organo de la belga sekcio de la **Eŭropa Asocio de Edukistoj** (AEDE). Do informado al ekstero.

Novaĵoj el Francio: post longtempa strebado de aparta komisiono de Esperanto-Francio, la **franca ministerio pri edukado** ĵus oficiale sciigis tiun komisionon, ke eksperimenta instruado de nia lingvo povos ekkazi, kie lernejestroj bonvolos. Ankaŭ notinde estas, ke dum kvin jaroj okazos taksadoj de la atingitaj rezultoj – ĉefe ĉu gelemantoj kaj instruistoj montriĝos interesitaj lerni kaj instrui esperanton- la ministerio pripensas plivastigi enkondukon de tiu lingvo en la franca edukada sistemo. ILEI decidis subteni tiun alvokon kaj disvastigi ghin.

Kontaktoj kun enmovadaj institucioj

Maje la Estraro delegis per sia voĉdono kaj decido la doktorinon Ilona Koutny reprezenti la Ligon ILEI en la **Fondumo L. Zamenhof** en Bialistoko, Pollando, por la nova deĵorperiodo 2015-2018.

Maje venis propono pri kunlaboro de la ĉefa afergvida oficisto de la projekto “**Amikumu**”. La Prezidanto faris dissendon de alvoko pri tiu kunlaboro tra siaj kanaloj al sekciestroj. Tiu bona ideo povos esti tre utila por instruado de Esperanto.

En la juli-aŭgusta kajero de la **revuo Esperanto** en la ILEI-rubriko aperis artikolo de Mireille Grosjean "Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano en la tuta mondo".

Okaze de la kongreso de la **blinduloj LIBE** en Sokobanja, Serbio, kie nia estrarano Radojica Petrović ĉeestis kaj prelegis, venis al ILEI la sugesto organizi efike kaj moderne la aliron de la enhavo de IPR al blinduloj. La afero estas en prilaborado.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn!

Vicsekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

Busano, Koreio

2017-07-15